

# La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto :  
vers une culture sociale sans frontières.



**1951-1962:**

**Usonanoj en Ĉatoruso...**


**...iama**

«- Mi amas vin !  
- Ankaŭ mi ne !»  
inter nia loka koko  
kaj ilia kokakolo !



Artikolo p. 6

## La-Saga sagao de « Kiel traduki »



IS-epizodo : *La unua eldono  
helpo iras Afriken...* (p. 16)

AS-epizodo : *Andreo recenzas  
Andreon...* (p. 10)

OS-epizodo : *Ĉu Guglo la  
sukcedonto ?...* (p. 14)



# Legindaj Legendoj

## Arturo ĉe Ronda Tablo.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

La peza kastelo kaŭras en la vasta Kimria arbaro. La ĉefturo okupas la centron de korto ĉirkaŭita de muregoj kun kreneloj kaj embrazuroj. Humida fosaĵo en kiu korusas ranoj kaj bufoj stagnas piede de la murego. Levponto<sup>1</sup> foje pontas, foje duobligas la pordon de la ununura enirejo.

Potencia reĝo Arturo loĝas tie, ne ĝenata de la najbaroj. Ili loĝas mejlojn<sup>2</sup> for. La reĝo kaj liaj kompanoj okupas sin per ĉasado. Aproj kaj kapreoloj abundas. La kavaliroj postrajdas kaj trapikas ilin per lancoj. Tiel, ili kaj la batalĉevaloj<sup>3</sup> bontenas siajn fortojn kaj lertecojn. La viandomalmultkostekontribuas al la nutrado de la kastelanoj. Kompreneble, oni bezonas ankaŭ hordeon kaj sekalon por diversigi kaj kompletigi la dieton. La servutuloj<sup>4</sup> kultivas ilin kaj portas impostan parton al la kastela rezervejo por pagi la rajton kulturi la kampojn kaj la protektadon fare de la reĝo.

Foje, soldata bando rajdas tien-ĉi por forrabi la rikolton. Poste, okazas portempa malsato kaj Arturo reciprokas al tiu najbaro aŭ alia. Tia estas la mezepoka vivo.

Nova malfacilaĵo iam aperis. Aldone<sup>5</sup> al la regionaj soldatoj, kiujn entute oni bone konis, fremdaj taĉmentoj skolte<sup>6</sup> venis tien aŭ tien ĉi. De kie ili venas? Ĉu ili aŭguras invadon? Oni nomis ilin Germanoj. Oni ne akceptu fremdulojn. Nepras organizi defendon. Oni militu inter si.

Tial, Arturo kunvenigis siajn vasalajn kavalirojn, Lanceloton, Gaŭvenon, Percevalon, Tristanon kaj aliajn. Ili alvenis, bele blazonizitaj<sup>7</sup>, por konsiliĝi, diskuti, akordiĝi, determini defendon, en la rondan salonon de la ĉefturo. Torĉoj kontraŭ la muroj provis kompletigi la lumeton envenantan tra la embrazuroj<sup>8</sup>.

La fieraj kavaliroj surbenke sidadis ĉe la tablo ronda. Pladoj de viandoj sin prezentis, el kiuj krudaj fingroj eltiris pecojn, kiujn la makzeloj ŝmace<sup>9</sup> maĉadis. Multaj kruĉoj akompanis la solidajn manĝaĵojn, kaj vinaĉo fluis el la pokaloj en la gorĝojn, kaj elo, kaj medo, kaj viskio. Strategio? Malfacila milita preparado postulas tempon kaj diskutojn. Lanceloto varmkore<sup>10</sup> strebis al la reĝino Genjevro. Oni sekure konservis la freŝajn virgulinon en aparta ĉambro. La kavaliroj redunde kaj fanfarone rakontis siajn pasintajn grandfarojn, kiel ili serĉadis la Gralon, kiu iam perdiĝis. Gravas la Sankta Vazo, kiu bonaŭgure entenas guton de Palestinana sango, kiun Krucisto<sup>11</sup> kunportis el Jerusalemo. Venis tikla momento, kiam Lanceloto ekscitita



de paroloj kaj vino, vikle levis sian spadon Ekskaliburo<sup>12</sup> kaj plantis ĝin en ŝtonegon de la muro, kvazaŭ en stomakon de malamiko. Neniu kapablis eltiri ĝin kaj dum jaroj la armilo servis por pendigi la mantelojn. Longe daŭris la konsilia kunsido. Post jaroj, oni nomis ĝin la tria matĉduono ĉar supozeble, du aliaj jam okazis antaŭe.

Tio estas historia evento. Eblas tamen, ke la laca memoro de la aŭtoro konfuziĝas. Oni jam preparis tiom da militoj, ke iuj detaloj eble devenas de aliaj cirkonstancoj.

**Klod laŭ malnovaj legadoj.**

Notoj:

- 1 Levponto estas enir-ponto super la kastel-ĉirkaŭfosaĵo, levebla por malebligi la eniron.
- 2 La mejlo egalas 1,609 kilometrojn.
- 3 Fortikaj ĉevaloj por batali.
- 4 Uloj por servuto. Preskaŭaj sklavo.
- 5 Kiel aldono, plie donata.
- 6 Kiel diskreta avangardo, por spioni.
- 7 **Blazonoj ornamis ilin.**
- 8 Aperturoj de la mallarĝaj fenestroj.
- 9 Kun buŝa bruo.
- 10 Kun varma koro (kaj sango).
- 11 Iu, kiu partoprenis en Krucmilito.
- 12 Ekskaliburo estis magia spado.

Imagaj blazonoj de kvar famaj rondtabluloj...



### 7 - Blazonoj ornamis ilin...

«Ili alvenis bele blazonizitaj...» La Arturaj legendoj, kaj de ties kavaliroj de la «Ronda Tablo» rilatas al eventoj kiuj datumas de la fino de la kvina jarcento, komence de la sesa, dum blazonoj ne aperis antaŭ plej frue la 11a jarcento... Do eksterdube la rondtabluloj ne havis blazonojn. Tamen en la periodo kiam naskiĝis la legendoj, ne eblis imagi tiajn heroojn sen blazonoj. Kreiĝis do tio, kion oni nomas «Imaga heraldiko», kiu konsistas en atribuo de blazono al famuloj far aliulo. Jesuo, Davido, eĉ Dio tiel ricevis blazonojn! Kvankam fantaziaj, tiu blazonoj estas interesaj, ĉar ili ebligas kompreni kiel oni vidis la blazonitojn en la imago de la krea periodo.

## Helpado al eksterfrancianoj

Ĉi-jare sendinte al diversaj 13 adresoj en Afriko + 1 en Haitio, mi elĉerpis la stokon de „Nouveau Cours Rationnel“.

Do la ĉi-jara bilanco resumiĝas per tiuj du nombroj: 87,711 kg - 246,96 € da sendokostoj.

Kiel jam anoncote pasintjare mi ekde nun rezignos pri persona respondecado rilate al helpado al Afrikanoj nome de SAT-Amikaro. Sekve mi finpretigos la tuton, kiu plu restas en 8 kestetoj kaj tuj poste ekrilatos kun la anstataŭantoj por transdonado.

**Jean-Yves Santerre**

Denise Prie Le Fol kun skipo el Dinano sin proponis daŭrigi la taskon kontakti kaj ĉiujare sendi pli ol 500 librojn, kasedojn, ĵurnalojn.

## Kasraporto 2011

ne estas preta; ĝi estos prezentata en la kongreso kaj publikigota en La Sago 84.

Ni proponos mocion por anstataŭi nian nunan elektran proviziston EDF per ENERCOOP, kooperativo kies elektro fontas nur el renovigeblaj energioj. Kostus 25% plie ĉirkaŭ po 500€ jare.

Ni gratulas la duonon de nia membraro kiu jam repagis sian kotizon 2012. Ni petas de la dua duono rapide kotizi por ŝpari realvokojn, kiujn ni lanĉos tuj post la kongreso.

Memoru ke vi povas scii ĉu vi (ne) aliĝis por 2012, legante ĉi-tiun informon en la sendofolio de La Sago.

**GiMo, Kasisto**

## Nekrologe

Nin trafis la tute ne ĝojiga informo, laŭ kiu forpasis Kristiano Vaĉerono (Vacheron), la kvaran de februaro.

Detala artikolo pri li aperos en La Sago 84.

Ni kondolencas al ĉiuj kiuj afliktiĝas pro la okazaĵo, do ja al multaj homoj.

**Redakcio.**



# SAT-amikaro

## Agadraporto 2011

lom malkutime al antaŭaj jaroj, jen ĉi foje raporto listiganta atingojn k lamaĵojn.

Eble plej notindaj pozitivaj punktoj el ĉi tiu agadjaro estas:

- ♦ sukcesa okazigo de Interasocia Renkontiĝo en kiu okazis

- ♦ unuafoja projekciado de la atendata filmo «Esperanto» de Dominiko Gaŭtiero (Gautier) k

- ♦ lanĉo de petskriba kampanjo por Eo ĉe la abiturienta ekzameno en Francio;

- ♦ ekfunkciigo de reta anaro-listo (kiu ebligas interligi la membrojn inter la kongresoj k monataj revuoj);

- ♦ pliampleksigo de la peranto-reto;

- ♦ partopreno en la indignula movado;

- ♦ eldono de Kiel Traduki..., dua eldono reviziita k grave ampleksigita kun aldono de parto pri «kiel esperantigi proprajn nomojn», 500 ekzemplere (unua eldono en 2009, 300 ekzemplere eldonita, estis tutelĉerpita);

- ♦ regula apero de kvalita revuo;

- ♦ alveno de rekorde multaj novuloj en la asocion, inter kiuj multaj aktivemaj

- ♦ ekigo de rilatoj kun eksterfranciaj esperantistoj (ĉefe el Afriko);

- ♦ planado jam de kongreso 2013 en Metabjefo (Métabief).

Inter la notindaj malpli kontentigaj punktoj (do pri kiuj eblas, indas, endas plibonigoj!) aperas:

- ♦ zorgiga malaltiĝo de la membraro-nombro (apero de novuloj ne superas morton de fidelaj anoj k kvanton da nerekotizuloj), kun 465 anoj en 2011 (482 en 2010);

- ♦ prema manko de homfortoj por ĝenerala funkciigado de la asocio, kiu okazigas pli k pli senteban elĉerpon de nunaj aktivuloj, kies troŝarĝitaj ŝultroj komencas serioze malfortiĝi, notinde pri:

- ♦ ĝenerala administrado;

- ♦ celoplenumaj taskoj varbaj al Eo k SAT.

Tiu problemo pri troeco de taskoj kompare kun maltroeco de aktivula forto sentebliis diversmaniere:

- ♦ malapero de la franclingva suplemento de La Sago (k neapero de la laŭplane anstataŭa jara fr-varbkajero okpaĝa);

- ♦ malfacilo organizi kongreson 2012 kun surlokaj aktivuloj por ĝin prepari;

- ♦ duonforlaso de reteja prizorgado kun reta informletero ne plu monata sed nur sporade aperanta k kruda momenta ĉesigo de l' publikigo de franclingva kurso surbaze de E-proverbaro;

- ♦ prokrastigo de la finaperigo de DVD de la filmo «Esperanto» kun sekva troega atendigo de la antaŭmendintoj, kiuj prave malpacientiĝas pri la afero;

- ♦ pena organizo de deĵorado k sideja vivo ĝenerale;

- ♦ kriziĝanta situacio pri la libroservo, kiu reprezentas gravegan sed ege grandan laboron kiun praktike plenumas kvazaŭ nur unu homo, kiu havas siajn limojn;

- ♦ perkorespondaj kursoj lame okazantaj pro manko de taskotranspreno (la organizo de ĝi estas momente - sed jam de pli ol jaro! - prizorgata de la nuna enpaĝiganto).

## Enhavo

<b>SAT-Amikaro</b>	
Helpado al eksterlandanoj	2
Kasraporto	2
Agadraporto	3
Kribrado de la referendumiloj	4/5
<b>SAT-Amikaro - Kongreso</b>	
Lastaj informoj	4/5
<b>Flanke de l' kongreso</b>	
Usonanoj en Ĉatoruso	6
La regiono Berio	12
Banquet de la Libre Pensée	13
<b>Analizoj/opinioj</b>	
Pruvoj de mito-maniulo	11
Pri komunikado, instruado, lernado	13
<b>Lingvo</b>	
Kiel traduki : Tant	7/8
Legindaj legendoj	2
<b>Libro-servo</b>	8
<b>Recenzoj</b>	
Libro vivas pli longe ol unu sezono	9
Kiel traduki 80 franclingvaj...	10
<b>Humuraĵoj-diversaĵoj</b>	
Selle-humuraĵoj	10,12,14
HuMorelaj Linioj	13
BD: La tribuloj 7	16
<b>Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement</b>	
Staĝo San-Briego	14
Regiona renkontiĝo Bretonio	14/15
Loka Scia Forumo	14/15
Prelego Brasses en Esperanto	15
Esperanto-Centro en Burundio	16

Tiu ĉi raporteto cetere mem suferas multajn mankojn pro interalie supremenciitaj aferoj. Tamen ĝi estas kompletigebla k ĉefe celas estis bazo de ĝisfunda diskuto pri celoj k strukturo de la asocio dum la kongreso, por ke la agado estu pli efika k celkonforma en postaj jaroj.

Por la komitato, la sekretario,  
Markovo-Vito

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

**Ĉefredaktanto** : Vito Markovo. **Enpaĝiganto**: Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo**: Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de**: Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos.

**Partoprenis en ĉi numero**: Jean Amouroux, Andreo Andrio, Francis Bidron, Manĵo Clopeau, Guy Cavalier, André Cherpillod, Mireille Grosjean, Klod, Ĵak Le Puil, Vito Markovo, GiMo, Jocelyne Monneret, Lin' Morel', Marcelo Redulez, Jean Selle, Jean-Yves Santerre, Serĝo Sir', Philippe Stride, Ŝtonĉjo, Fernand Vurpillot.

### Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

**Serge Sire** (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : [lasago@free.fr](mailto:lasago@free.fr)

- Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

- Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

- Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

- *de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.*

- *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

- *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**

# Pluvivigu vian ekzempleron de la unua eldono de «Kiel Traduki»

Okaze de la kongreso, ĉe la Libro-Servo, se via ekzemplero de la unua eldono estas en bona stato, ni reprenos ĝin kaj rabatos 3 € por la aĉeto de la nova.

La reaĉetitajn ekzemplerojn ni sendos al malriĉaj franclingvaj landoj (ĉefe Afriko, sed ne nur). Ni insistas ke la malnova libro nepre estu en bona kondiĉo, pro simpla respekto, oni ne sendu rubaĵon, sed ion kun nediskutebla valoro.

Ĉi-kune, fotoj el Rumongo (Burundio) kie konstruiĝas Esperanto-Centro.SAT-Amikaro sendis tien diversajn librojn, inter ili la unuajn reaĉetitajn «Kiel Traduki».

fotoj senditaj de Hassano Ntahonsigaye kaj Jérémie Sabiyumva.

## Plu moviĝas la movado Rumongo, Burundio



*Mi ja devas konfesi ke vi estas la plej taŭga edzo, pri kiu eĉ reve mi ne povis esperi...*



*Ĉu ne la realo? Ĉu mi ne pravos?*

*Nu...se vi mem diras...*



*La plej delikata, sentema, sprita, inteligenta viro, kapabla transporti mian menson,...*



**La Tri-buloj 7**



*Nu, mi repagu konfesante ke vi estas tia mirinda virino, kiu ja tute meritas kunulon kiel mi!*



*... kaj eĉ mian korpon, en la plej altajn stratumojn!*



*Aĥ! Jen la makulo kiu fuŝas la tuton: via senlima virvira orgojlo!*

